

AMERICAN ESPERANTIST

Vol. 53

AMERIKA

ESPERANTISTO

Nur rekte, kurage,
kaj ne flankigante
Ni iru la vojon
celitan;
Eĉ guto malgranda
konstante frapante
Traboras la monton
granitan.

L' espero, l' obstino
kaj la pacienco,—
Jen estas la signoj,
per kies potenco
Ni paŝo post paŝo
post longa laboro
Atingos la celon
en gloro.

☆☆☆☆

LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKA

☆☆☆☆

Central Office Joseph Leahy, General Secretary
1410 H Street, N-W., Washington, D.C.

Centra Oficejo

Joseph R. Scherer, Los Angeles, California.

E.G. Dodge, Washington, D.C.

President

Chairman Executive Committee

Number 12 * * * * \$1. per year-anywhere * * * * 10c a copy * * * * October 1939.

U S A and EANA representatives at the Universal Esperanto Congress in Bern, Switzerland, were very much in the pictures. On another page Miss Tappan is seen entertaining the members with scenes from her childhood home-Montana, and Mr. Connor, in cowboy costume "in good company". VIVU.


ESPERANTO EXHIBITION

Through the efforts of Miss Roan U.Orloff, Mr.G. W.Lee and Mr H.B.Hastings an "Exposition" was arranged in 2 large showcases on the Grand Staircase of the Boston Public Library. One case contains Esperanto books, and periodicals, with a world map showing the country of origin by means of green ribbons. The other case contains Esperanto literature both original and translated, including the Bibleworks of Bamenhof and of Shakespeare together with numerous textbooks, Dictionaries, etc. The exhibit will continue for two weeks and is in a place where it may be seen by many hundreds of people.

This is only a small part of the program laid out by the Boston Ferovoruloj for the extension of Esperanto. in the near future.

(We wonder if this great activity is preliminary to a possible bid for the 1941 Congress somewhere in New England-preferably Boston or near it. WHY NOT?

Besides the many very active Esperantists there, the scenes of American early history appeal to all.)



SOLENA MALFERMA KUNSIDO DE LA TRIDEK-UNUA

La estrado kun la oficialaj Re prezentantoj kaj la Kongresa Estraro. Parolas la Kongresa Prezidanto, s-ro Jakob Schmid, Honora Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato.

Lady in white dress(center) is Miss Doris Tappan of New York, official representative of the United States Government. Back of her is Mr.George A.Connor, representative of E A N A.

PATRONO kaj SUBTENANTO.

H O N O R R O L L 1939-1940

Mrs. Luella K.Beecher
Lima, Ohio.
Miss Grace Randolph
Greenville, R.I.

Mr. E.G.Dodge
Washington, D.C.
Mr. Fred H.McMann
Troy, N.Y.
Mr. Virgil Dibble
Columbia, S.C.

★
* * * * *
JUST ARRIVED, Aug.2, at the home of Fred H.McMann, Troy, N.Y. a new Esperantistino-Cornelia. GRATULOJN.

* * * * *

THEY ALL BEGIN TO USE IT. People commence the study of Esperanto for various motives. With some it is mostly curiosity. They become Esperantists of short life, because curiosity is soon satisfied. Others take it up seriously because of the mental culture derived from the study. These have much deeper root; for the more intensively one delves into the beautiful and logical word structure of Esperanto, the richer mental food he discovers. Most enduring and hardest working among Esperantists are those who hold most clearly to the vision of a better world to be, in the building of which the destruction of language barriers through the world-wide auxiliary tongue is to play a glorious part.

Somewhere between the extremes in the series of "reasons" lies the study of Esperanto for its practical uses -- use for wholesome fun at club meetings -- use for travel abroad -- use for commerce -- use for international correspondence -- use for study of comparative literature -- use for advertising -- even use for propagandizing one's own ideas. We must welcome them all -- whether we sympathize with all the uses or not. Esperanto was a free gift to the world, and the world is free to use it.

Moreover, the world is finding out that it pays to use it. Just a few examples -- and the list could be long. From Hongkong and south China have been sent out, free of charge, thousands of magazines and pamphlets in Esperanto, to lay before the world the facts of the war as China sees them. On the other hand, from Japan has come a free distribution of Esperanto pamphlets, revealing what is now in the Japanese mind. From both Valencia and Barcelona, during the civil strife, came forth numerous statements in Esperanto, revealing what was in the mind of Republican Spain.

But let us turn from wars and rumors of conflict to the pleasanter field of the tourist. The railways of Japan have issued beautiful tourist booklets in Esperanto. The government railway of Manchoukuo, ditto. The lovely capital city of Brazil has issued an attractive descriptive book for tourists -- Esperanto, of course. Radio broadcasts disseminate at regular intervals, in Esperanto, information of interest to tourists -- several countries. And from Italy there emerges a regular series of handsome tourist supplements, which may be had in any one of six languages, five of them national, and the sixth -- international, our own Esperanto. Latest of all, just the other day

<p>"Mi deziras ke Italujo estu vizitata de kiel eble plej granda nombro da fremdaj turistoj. Ili trovos belegan landon, ordeman kaj sincere gastaman popolon" Mussolini</p>	<p>there came from Italy, all unsolicited, a packet of tourist literature, among which is an invitation card in five languages. In the four corners stand the invitations in German, English, French, and Dutch. While the invitation in Esperanto (here reproduced at the left) stands in the <u>center</u> of the card, where by logical right the international language belongs!</p>
---	--

Yes, the world is beginning to use practically, for its own various purposes, the Esperanto language. Shall not we, the spiritual heirs of the noble creator of the language and of his courageous followers, be more faithful in using Esperanto for the central purpose out of which it was born -- the making of mankind "brothers" of one household, by giving them the ability to ignore language barriers, and to intercommunicate through a tongue that is "mother tongue" to them all?

Rilate la tre deziratan efektivigon de paco, kiel celo de Esperantistaj aspiroj, la fondintino de organizo en Parizo, kiu nomas sin "Fraterneca Esperanto-Movado," proponas kiel devizon: "Ni konstrui la pacon." Ŝi kredas ke "penso" estas granda decida forto en homaj aferoj. Kaj ŝi proponas ke la pacamanto nepre metu metu ŝiutage, en apartan ŝparĝeston, la sumeton de unu franca franko, (usone, "one nickel,") samtempe farante aŭ preĝon aŭ elkoran kreigan penson, favore al paco inter nacioj, inter rasoj, kaj en la homa koro. Je fino de la monato, oni nombru la nikelojn, por konstati ĉu li fidele pensis pri paco ŝiutage. Poste oni elspezu la monon, laŭ propra konscienco, por la kreigo de paco kaj por efektivaĝo de pacaj sentoj inter homoj.

CSEH IN OKLAHOMA CITY. Oklahomans are bubbling over with enthusiastic anticipation for the coming of Miss Roan U.Orloff, Boston Cseh-Method Teacher of Esperanto, who will devote her vacation time to the uplift-Esperantically-of record-breaking classes in search of MORE LIGHT IN ESPERANTO. Bondezirojn al la klaso kaj la Orloff. VIVU!



ALVOKO EL SUD-AMERIKO.

*La pasintan aŭguston, F-ino Florence Rivere, fidela samideanino el Novjorko, *ĉeestis la kongreson de la Tutmonda Federacio de Edukadoj Asocioj, en Rio de Janeiro. Ankaŭ, ŝi kunportis la oficialan saluton de EANA al la Brazilaj Ligo Esperantista. La Esperantistoj tre varmkore bonvenigis ŝin, kaj afable *donacis al ŝi plurajn valorajn librojn.

*Je disigo, S-ro Ismael Gomez Braga, elstare agema inter la brazilaj samideanoj, konfidis al ŝi salutleteron por la novjorkaj Esperantistoj aparte, kaj por la usonaj samideanoj ĝenerale.

S-ro Braga estas pioniro de nia movado en la suda kontinento, ĉiam agema, ĉiam optimisma pri la nepra fina venko de nia "paca batalado". Li estas mem la aŭtoro de pluraj libroj, el kiuj "Veterano?" (la unua originala Esperanto-verko presita en Brazilo) estas nun verŝajne la plej vaste konata. La grava alvoko de nia samideano Braga estis ja skribita antaŭ la fineksplodo de la nuna militego. Sed liaj vortoj estas ankoraŭ trafe veraj. Ke ili instigu la novmondajn Esperantistojn al pli lojalaj, pli senĉesaj laboroj! Plezure do ni presas sube la salutleteron.

Rio-de-Janeiro, la 8-an Aŭgusto, 1939-a.

Al la ESPERANTO-ASOCIO DE NORDA AMERIKO kaj ESPERANTO-ASOCIO DE NOVJORKO Estimataj Samideanoj:

El tuta koro mi dankas vian saluton pere de prof. Florence Rivere kaj deziras al via brila laboro senfinan gloron.

Al mi ŝajnas ke la mondhistorio rezervis al ni en la juna Ameriko la gloran laboron ricevi, konservi kaj eterne kreskigi la plej grandiozajn mondideojn.

Niaj karaj samideanoj en Eŭropo kaj Azio tre brile kaj energie laboras de 52 jaroj, sed al ili nun mankas pacema klimato por vivantigi nian ideon. Regas nokto sen lumo en la animoj kaj timo en la koroj.

Ĝis nun nia movado en la Nova Mondo tre multe ricevis el Eŭropo, de nun tamen ni nepre devas stari kaj marŝi per propraj piedoj, se ni vere komprenas la situacion de niaj samideanoj en la Malnova Mondo.

Ĉu ni ne povos kunigi niajn fortojn por reciproke nin helpi en la tuta kontinento? Kion vi konsilas?

Kion ni povos kune fari por helpi kaj progresigi la movadon?

Ĝis nun nia renkontejo estis la eŭropaj gazetoj kaj revuoj. Al ni mankas tutamerika organo, ĉu gazeto, ĉu eldonejo, ĉu asocio. Kion povos ni fari por interligi nin kaj kunlaborigi?

Eĉ se militego ne tuj venos, la militstato ekzistas en la eŭropa animo.

Mi uzas la okazon de tiu saluto por peti vian altvaloran pripensadon pri nia tutamerika movado.

Kun samideana saluto mi restas, Samideane via (Ismael Gomez Braga)

Letero al U. E. A.

Sub la dato de 24 julio 1939, direktis s-ro André Baudet en Parizo la jenan leteron al Universala Esperanto-Asocio, Palais Wilson, en Genevo:

Sinjoroj, Dum dekok jaroj mi faris mian eblon por helpi al disvastigo de Esperanto, speciale en la komercaj rondoj, kaj mi estis sufiĉe feliĉa por atingi kelkajn interesajn rezultatojn. Tial en 1933 la Universala Esperanto-Asocio nomis min « Honora Membro », kaj tiu elmonro de simpatio tre kortuŝis min.

Sed, kvankam mi pli speciale laboris sur la kampo de praktikaj rezultatoj, mi neniam forgesis la idealan flankon de nia movado, la interproksimiĝon de homoj kaj popoloj, kaj, fine, la pacon en la mondo.

Tial mi estis surprizita kaj indignita, kiam mi vidis, unue, ke kelkaj esperantistoj sin ŝirmis sub proceduraj artifikoj por bari la vojon al la granda plimulto pro personaj kaŭzoj, en cirkonstancoj kiam neniu motivo de ĝenerala intereso rajtigis krei disigiĝon en la movado. Tiun indignon anstataŭis naŭzo, kiam mi vidis, ke tiuj samaj homoj denove sin turnas al la tribunaloj por postuli repaĝon de sumoj elspezitaj por esperantaj celoj kaj monkompensoj pro malutilo al UEA. Kontraŭe, estas la persekutantoj kiuj, per sia nepravigebla obstineco, faris ĉion por malhelpi funkciadon de la granda Asocio, kiu grupigis ĉiujn Landajn Asociojn, kaj la preskaŭ tutajn de la Esperanto-vidantoj.

Ĉiu disigo estas malforto, precipe en la nuna tempo, kiam ni pli ol iam ajn bezonas unuecon. Mi tute ne volas ŝajne pravigi tiujn manovrojn.

Pro tiuj motivoj mi malaprobas la pereigan agadon de UEA en bedaŭrinda afero, kaj, por ke mia nomo ne estu ligita kun tiu agado, mi sendas al vi mian eksigon kiel « Honora Membro » de UEA.

Konsekvence, mi formale malpermesas uzadon de mia nomo en la jarlibroj de UEA, kaj en ĉiuj formoj de via propagando.

Akceptu, Sinjoroj, miajn salutojn.

ANDRE BAUDET.

XXXIII CONGRESS, LIMA, OHIO. July 1, 2, 3, '40.

Lima Enthusiasts are busily engaged in making arrangements for the forthcoming Congress, which they are determined will eclipse all others. ESTU PRETA. MAKE UP YOUR MIND TO BE THERE.

UNCERTAINTY WORRY. Almost everyone has relatives or friends in Europe. How are they faring?

LA AMERIKAJ HONORAJ GARDISTOJ ZORGOSKE NIA KANDELO NE ESTINGIĜU .

Kiel mi opiniis en mia artikolo en "Heroldo de Esperanto" 23. aprilo 1939 nova milito nun eksplodis en **Eŭropo**. La malfeliĉaj gesamideanoj en la koncernaj landoj ne povas plu labori por paco kaj verŝajne malmulte por Esperanto. Do en la ceteraj landoj la gesamideanoj devas **des pli fervore** labori kaj oferi por nia lingvo. Ni ne rajtas dormi. Post la milito la Esperantistoj de la malfeliĉaj landoj demandas nin: "Kion vi dume faris en la neŭtralaj landoj? Ĉu vi laboris aŭ ĉu vi lasis Esperanton morti?" Do certe ni ne povas dormi nun!

S-ro C.C. Goldsmith, la ĝenerala sekretario de I.E.L. skribis al mi: "....Ni bezonas la subtenon de ĉiuj fervoraj Esperantistoj, kaj mi estas certa ke el Usono kaj el la cetera Ameriko ni ricevos helpon...."

Se la milito longe daŭros, eble nia movado similos al malforta kandela fajreto brulanta en la mezo de uraganaj ventoj. Sed la plej fortaj ventoblovoj ne kapablos estingi la kandelon; neniŭ milito, neniŭ militema diktatoro povas detrui Esperanton, se ni en la neŭtralaj landoj ĝin protektos.

La fina venko de Esperanto plej verŝajne venos subite pro favoraj cirkonstancoj, se ni ne lasis morti nian kandelon en la mallumaj noktoj de militaj jaroj. La mondo sopiras pacon, kaj bezonas Esperanton, sed ankoraŭ ne ekkonis tiun urĝan neceson. La mondo ankoraŭ ne kredas ke nia lingvo estas la plej bona solvo el nia lingva kaj diplomatia ĥaoso.

Certe venos tiu tago, kiam la mondo SUBITE konstatos ke nia neŭtrala, ideale perfekta lingvo solvas urĝan problemon kaj faciligos veran mond-pacon. Tiam Esperanto preskaŭ sen klopodoj niaflankaj estos oficiale akceptata. Sed dum militaj ventegoj klopodas estingi nian sanktan fajron, ni devas protekti ĝin, ĝis kiam ĝi povos pli grandskale lumigi la mondon.

La usonaj gesamideanoj ne estas malkuraĝuloj. Kaj mi certas ke la gesamideanoj en Meza kaj Suda Ameriko same sentas. Ni en Ameriko nepre restos fidelaj. Ni varbos novajn amikojn. Ni daŭrigos la instruadon al novuloj. Ni fidele subtenos per membrokotizoj la lokajn klubojn, niajn diversajn naciajn kaj distriktajn asociojn, kaj la Internacian Esperanto-Ligon kies oficejoj estas en vilaĝo ekster Londono, for de la danĝero de bombardado. Mi verkas tiun ĉi artikolon ne nur por la "Amerika Esperantisto" sed ankaŭ por ĉiuj aliaj amerikaj Esperanto-revuoj, ĉar mi certas ke la legantoj de ĉiuj konsentas al la supraj kordeziroj.

La amerikaj gesamideanoj devas esti inter la "Honoraj Gardistoj" por helpi ke nia kandelo ne estingiĝu. Ni devas legi kaj subteni la diversajn naciajn gazetojn Esperantistajn kaj laŭ nia plej sincera kapablo kaj ofereco ankaŭ la gazetojn "Heroldo de Esperanto" aŭ "Esperanto Internacia", eĉ se ili devus dum kelka tempo aperi iom malpli ampleksaj.

Eĉ tiuj gesamideanoj kiuj ĝis nun kredis ke ili ne povas oferi kupran moneron ĉiutage (eble \$2-3-5 jare) por progresigi nian lingvon, NUN ili DEVAS helpi ankaŭ - por vivteni Esperanton. Per ĉiu dolaro oferata por Esperanto vi fariĝas dum unu horo "Honora Gardisto" por la "sankta fajro" de nia kandelo. Kaj kvankam mi estas nur la Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko, mi kredas ke mi esprimas la sentojn de ĉiuj kiam mi promesas al la Esperanto-movado tutmonda la fidelan helpon de ĉiuj amerikaj gesamideanoj.

Joseph R. Scherer

